loĝas ĉe ni sed en Sabadell.

Pri la periodo de nia historio, kiu komenciĝas nun, ni disponas je iu informo-fonto kiu mankis al ni por la antaŭaj etapoj. En la arkivo de la Asocio ni trovis tekon kun dokumentaro (leteroj kaj aliaj skribaĵoj) de 20 jaroj de la vivo de la Grupo Esperantista Jovellanos, kreita en Gijón kaj gvidita de Alberto Menéndez dum multaj jaroj. Estas ankaŭ la aktlibro de la asocio kun raporto de ĉiuj kunsidoj de la estraro kaj asembleoj de la membraro de la Grupo.



La gijona geesperantistaro. Somero de 1959

En la jaro 1958 eblis krei E-grupon en la Ateneo “Jovellanos”. La Ateneo Jovellanos estas prikultura asocio kreita en la jaro 1953, dank’ al la iniciato kaj apogo de aro da elstaraj civitanoj de Gi-jón subgvide de S-ro Tor-cuato Fernández Miranda. Ĉi lasta estis homo tre ligata al la frankisma politika reĝimo, kaj lia kreaĵo, la Ateneo, tre ege troviĝis en la orbito de tiu politiko.

Kvankam Alfredo ne membris ĉe la Ateneo Jovellanos, li tre kunlaboris kun la esperantistoj kiuj aniĝis al ĝi. Fakte, estis li kiu redaktis la oficialan peton al la Prezidanto de la Ateneo por la fondo de E-grupo kadre de tiu institucio. Tiu peto havis daton je 19a de aprilo 1958.

La respondo de Ignacio Bertrán, Prezidanto de la Ateneo, estis sufiĉe malvarma kaj malkuraĝiga. Kvankam oni permesis la kreadon de la E-grupo, oni neis al ĝi ejon por la sekretariejo de tiu grupo kaj la lernoklasoj de Esperanto. Ŝajnas ke en la teksto de la peto, ellaborita de Alfredo Villa estis iuj aludoj kiuj vekis rifuzon de la gvidantaro de la Ateneo. En aŭgusto de tiu jaro la membroj de la grupo elektis iun provizoran komitaton por fari iujn demarŝojn celante venki la oponon de la Ateneestroj. Fakte la grupo estis jam funkcianta kaj por atesti pri tio Alfredo Villa verkis artikolon por ĝin publikigi per la presaro kaj radio, kaj oni sendis ĝin al la Prezidanto de la Ateneo mendante lian permeson, sed rezultis ke tiu sinjoro tute kontraŭstaris ke la grupo funkciu laŭ la komenca permeso. Tiam la elektita dupersona komitato konstituita de Alberto Menéndez kaj José Ordieres intervidiĝis kun Ignacio Lavilla, Prezidanto de la Atenea sekcio de Belarto, kiu tre afable akceptis ilin, kaj de tiam li tre varme defendis la aferon de la esperantistoj. Ekde la 1a de septembro de 1958



Decembro de 1959. Ekspozicio pri Presaro